


La Espero

SVENSKA ESPERANTOTIDNINGEN

Nro 4/1986 ★ Kr 8,50



Esperantoförbundet

Adress: EsperantoCentro,
Brunnsgatan 21, 111 38 Stockholm,
Telefon: 08-11 74 34.

EsperantoCentro är öppet
måndag-torsdag kl. 17-19.
Postgiro: 20 12-3, Esperanto-
förbundet.

Medlemsavgift:

Direktansluten medlem 75 kr
ungdomsmedlem t.o.m. 20 år 35 kr,
familjemedlem (utan tidning) 25 kr.
Prenumerationsavgift för *La Espero*
ingår i medlemsavgiften.

Medlemmar under 30 år är samtidigt
medlemmar i Sveriges Esperantisters
Ungdomsförbund och får dess tidning
Kvinpinto. Om du inte får den, med-
dela födelseår till Esperanto Centro.

Esperantoförlaget

Postadress:

Box 7502, 200 42 Malmö.

Besöksadress:

Möllevångsgatan 20 B.

Öppettider: 1 sept.-15 maj:

onsdagar 10-11, torsdagar 17-18.

Skriftna beställningar expedieras
hela året, även under sommarén.

Telefon: 040-12 20 29.

Postgiro: 578-5.

Expedition: Wivi Nilsson.

Styrelsens ordförande:

Anita Lindblom.

La Espero

Organ för Svenska Esperantoför-
bundet

Adress: EsperantoCentro

Brunnsgatan 21, 111 38 Stockholm tel
08-11 74 34

Ansvarig utgivare: Bertil Åkerberg

Redaktör: Karin Lindquist

Västermov. 19, 732 00 Arboga
tel 0589-155 31

Utformning: Bertil Danielsson,
Prästgårdsv 8, 672 00 Årjäng
tel 0573-105 69

Fotosats och tryck:

EsperantoCentro, Stockholm 1986



SEF:s styrelse

Ordförande: Karin Lindquist (La Es-
pero)
Västermov. 19, 732 00 Arboga tel
0589-155 31.

Sekreterare: Anita Lindblom
(kansliet, medlemsfrågor)
Oxelv. 53, 138 00 Älta
tel 08-773 40 24

Kassör: Börje Andersson
Ingeg. 4 A, 541 50 Skövde
tel 0500-122 05

Vice ordförande: Märtha
Andréasson, (SEF:s årskongresser)
Pl 2265, 425 00 Hisings Kärra
tel 031-57 11 33

Styrelseledamot: Kerstin Rohdin
(turnéer, bibliotek)
Ringv. 11 B, 579 00 Högsby
tel 0491-209 20

Styrelseledamot: Åke Rohdin
(massmedia)
Engelbrektsg. 25 A, 702 13 Örebro,
tel 019-18 53 60

Styrelseledamot: Birger Viggen
(jubileumsarrangemang)
Karlbergsv. 72 B, 113 35
Stockholm
tel 08-30 79 92

Suppleant: Ingemar Nordin
(massmedia)
Mosebacke torg 8, 116 45 Stockholm,
tel 08-41 46 37

Suppleant: Bertil Andréasson
(utbildning, nordiskt samarbete)
Södra Rörum, 242 00 Hörby
tel 0415-501 52

Informationskommittén: Bernt
Lindquist
Västermov. 19, 732 00 Arboga tel
0589-155 31

Utgivningsdatum för *La Espero* 1986: ca 31/1, 28/2, 30/3, 30/4, 15/6,
15/9, 15/10 och 30/11.

Manuskript till tidningen skall vara redaktören tillhanda senast en
månad före utgivningsdatum. Manuskripten skall vara maskinskriv-
na med dubbelt radavstånd, helst inga förkortningar. Bokstäverna
skall vara rätt övertecknade. Manuskripten skall vara av en sådan
kvalitet att en icke-esperantist direkt skall kunna sätta dem.

Annonspriser i *La Espero*:

1/1-sida	kronor 1 200
1/2-sida	kronor 725
1/4-sida	kronor 425
2 spalter x 6 cm	kronor 250

La Espero numero 5

Manuskriptojn al *La Es-
pero* 5/1986 mi volas havi
plej laste la 15-an de ma-
jo. La enhavo estos ĉefe
raportoj de la SEF-kon-
greso en Örebro.

Bonvolu sciigi min an-
kaŭ kion vi planas por
la *Esperanto-Tago* la
27-an de septembro por
inspiri aliajn klubojn.



Hur många "Esperanto-
främjare" har DU skaffat
under året?

Prezidanto:

Estas bonkonata fakto ke kiel esperantisto nia plej grava tasko estas: Doni informojn pri esperanto.

Nia moto inter la svedaj esperantistoj estas ja ke ĉiuj svedoj scios pri esperanto antaŭ la jubilea jaro. Ĉu ni estas survoje...?



INNEHÅLL/ENHAVO

- 48 Kondoleancoj pro la morto de Olof Palme
Grandaj donacoj
- 49 Bokauktion 4
Jarlibroj de UEA
- 50 Tra la lando
- 52 UEA informas:LPLP
- 53 La kunfratinoj
- 54 Juna amiko
Rememoro
Opinio
- 55 Internationell esperantokurs
En 1987 en Sofio okazos Ekspozicio de kolektaĵoj
Venis letero....
Nekrologo
Internacia Jura Revuo
- 56 Korespondpetoj
Krucvorto

Nur dum la du lastaj semajnoj ni povis aŭskulti dufoje pri esperanto en la radio. Unue **Lennart Åberg** en P1 rakontis pri sia riĉa esperanto-vivo kaj due **Yngve Nilsson** en P3 parolis pri esperanto. Ambaŭ programoj donis bonajn informojn pri nia lingvo. Kaj baldaŭ ni povos aŭskulti esperanto-lecionon gvidota de **Ingemar Nordin**.

Ni jam sendis tri artikolojn kaj al la gazetaro kaj al radio kaj televido. La unua pritraktis la UNESKO-rezolucion, la dua okazintaĵojn esperantajn en Svedio dum 1986 kaj la tria la SEF-kongreson en Örebro.

La Paca numero de La Espero ni sendis al ĉiuj parlamentanoj, popolaltlernejoj, superaj klasoj de lernejoj, bibliotekoj, internaciaj organizoj kaj sportorganizoj. Ni kunsendis la novan broŝuron kaj por ĉiuj grupoj speciale verkitan leteron, menciante la multajn avantaĝojn ricevotajn, se ili elektus esperanton.

Kiel ni vidis en la Espero numero 3 jam Amnesty konstatis la avantaĝon uzi unu komunan lingvon

en siaj internaciaj kontaktoj. Same faras la svedaj gvidantoj de Internaciaj Infanvilaĝoj. Danke al **Kerstin Kristofersson Märtha Andreasson** informis pri esperanto dum la jarkongreso de Yrkeskvinnors Riksförbund fine de aprilo. **Anna-Maria Lange** prelegos pri esperanto en la Popolaltlernejo sur Visingsö danke al **Inga Johansson**, kiu studis tie pasintjare. Dum la sporta libertempo 37 gelnantoj en Norrköping partoprenis enkondukajn esperantokursojn, kiujn gvidis **Margaretha Skarin** kaj **Mikael Hultgren** kaj la entuziasmo en Norrköping estas "sur la pinto".

La turneoj de la eksterlandaj prelegantoj, prelegante ne nur en la kluboj, sed ankaŭ en lernejoj kaj asocioj, donas eĥon en la gazetaroj. Pro tio estas grave ke la kluboj akceptas tiujn prelegantojn, kiam **Kerstin Rohdin** petkribas.

Sen troigi mi povas konstati ke kun helpo de ĉiuj informrimedoj kaj de multaj unuopaj esperantistoj ni atingis almenaŭ duonvoje nian celon...

Karin Lindquist

Kondolencoj pro la morto de Olof Palme

El multaj landoj de la mondo la Sveda Esperanto Federacio kaj niaj kluboj ricevis kondolencleterojn. Jen kelkaj ekzemploj.

El Oxford en Britio Marjorie Boulton skribas:

Karaj samideanoj, Mi sendas al vi profunde sentatajn kondolencojn pri la murdo de via pacamanta, liberamanta ĉefministro Olof Palme. La novaĵo pri tiu abomena krimo, en unu el la plej liberaj kaj humanaj landoj de la mondo, eĥis ŝok-onde tra multaj aliaj landoj. Mi ne ofte eklarmas pro la morto de politikisto, sed pri bonintencas-ro Palme mi en fora Britio kontribuis ankaŭ miajn larmojn al la funebrado de la sveda popolo.

Gerhard Böttcher kun edzino en Casabra, DDR skribas inter alie:

Sincera kaj senlaca batalanto por la paco en la tuta mondo estis murdita inside! Kun granda terurego ni konatiĝis pri la morto de via populara kaj altestimita sveda ministroprezidanto Olof Palme. — Valoras daŭrigi la senlaca laboron por konservo de paco en la tuta mondo per tuta forto kaj per ĉiuj eblaj rimedoj. Por ĉi tiu batalo nia internacia lingvo estas plej bona ilo, klerigi ĉiujn homojn, engaĝi sin por la Mondpaca Movado.

La Esperanto-Klubo en Falköping ricevis leteron de amiko en japana urbo Jokohamo, s-ro Doi Ciekio:

Per televido mi estis informita pri la murdo de la estimata kaj elstara ĉefministro de via lando, s-ro Palme, kiu afablis respondi al la kontraŭnuklea deklaro de nia gubernio. Mi estis multe ŝokita pri la informo. Mi devus pli frue respondi kaj danki al vi kaj al via estimata ĉefministro. Pro tio mi multe bedaŭras.

La Estraro de SEF ricevis kondolenckarton de la Esperanto-Akademio en Jhelum, Pakistano:

Tre estimataj samideanoj! Ni sincere kunsentas en la kruela periodo de via estimata ĉefministro Olof Palme. Kun granda doloro ni sciigis pri lia mortigo. Ni havas sincerajn kondolencojn al ĉiu ano de SEF kaj Svedujo.

La Esperanto Klubo en Varsovio estas amikklubo de la klubo en Stokholmo, kaj la pola prezidantino Zofia Banet-Fornalowa skribis:

Kun granda ŝoko kaj doloro ni eksciis pri la murdo de Olof Palme. Oni ĉesigis la vivon de la Homo, kiu vivis por ari bonon al la homaro, Homon kiu ĉiujn siajn fortojn, talenton dediĉis al konstruo de Paco kaj Justo inter la popoloj.

Nobla agado de Olof Palme estas proksima al koroj de la milionoj en la tuta mondo. Tio kiun Li faris por malakrigi la internaciajn konfliktojn, por levigi homan dignon, restos por eterne en la danko mentoro de la tuta homaro.

Olof Palme, laŭ sia pensmaniero kaj agado, estas proksima al koroj de la esperantistaro. Li ja laboris per ĉiuj siaj fortoj por atingi tion pri kio revis kaj batalis L.L. Zamenhof kaj por kio Li kreis Esperanton: por la Paco.

Ni esperu, ke idealoj por kiuj batalis karmemora Olof Palme venkos kaj ke via popolo trovos forton por daŭre ludi gravan rolon en monda pacbatalo.

SEF sendis kopiojn de tiuj leteroj, kun traduko, al Lisbeth Palme kaj la Sveda Registaro.

Grandaj donacoj en marto

Dum marto la SEF-kasisto notis kelkajn grandajn donacojn. Jen la donitaj monsumoj:

— Föreningen "Den hundrade apan", Enskede 1 036 kr
— Folke Johansson, Forsheda 100 kr
— Stockholms Esperantoförening, parto el donaco de Ingegerd Sääv 4 000 kr

4 900 kronoj al "100 jaroj"

Klubo Cent Jaroj ricevis dum marto donacojn por sume 4 900 kronoj:

— Ingegerd Ideland, Staffanstorp 100 kr
— Arvid Johansson, Huskvarna 100 kr
— Halmstads Esperantoklubb 2 000 kr
— Malmö Esperantoförening 2 000 kr
— Södra distriktet 500 kr
— Getrud kaj Torsten Lund, Malmö 200 kr

6 membroj en Klubo Cent

6 personoj pagis dum marto po 100 kronojn al Klubo Cent:

— Arvid Johansson, Huskvarna
— Gunnar Mattsson, Skövde
— Anna Eriksson, Sundsvall
— Malte Smith, Kävlinge
— S Uno, Motala
— Åke Palm, Malmö
— Dora Andersson, Linköping.
Pliaj "centoj" estas bonvenaj al SEF, poŝtĝiro 2012-3.



BOKAUKTION 4

En esperantist i Avignon bad oss om några Stellan Engholm böcker. Han behövde komplettera sitt innehav för att hålla ett föredrag om författaren på en konferens nyligen.

Vi gjorde vad vi kunde.

När du nu åker ut i sommar och kanske "våldgästar" och behöver ha med en present, tänk då att en esperantobok med nordisk anknytning kan vara väl så välkommen som något annat.

Vi kan bjuda ut följande skänkta böcker till högstbjudande. De flesta är häftade men alla är i tillräcklig god kondition för att bli en uppskattad present.

Gör som vanligt. Skriv önskade nr och vad du är villig att betala, och vi sänder mot faktura, och du betalar portot. Du har två veckor på dig efter tidningens ankomst.

Inbundna

81. Sveda Antologio I
82. Magda Carsson, Sveda Poemaro
83. Folke Bernadotte, La Fino
84. Heyerdahl, Kon-Tiki
85. Ferenc Szilagyi, Inter Sudo kaj Nordo
86. Ferenc Szilagyi, La Granda Aventuro
87. Stellan Engholm, Vivo vokas
88. Rolf Nördenstreng, La homaj rasoj de la mondo
89. André m fl, Per balono al la Poluso

Häftade

90. Selma Lagerlöf, La mono de Sinjoro Arne
91. Selma Lagerlöf, La Ringo de la Generalo
92. Selma Lagerlöf, La junulino de Stormyr

93. August Strindberg, Pasko
94. August Strindberg, Fraŭlino Julie
95. Hasse Z, Humora Novela
96. Sten Bergman, Tra Sovaj Kamĉatko
97. Stellan Engholm, Al Toronto
98. Stellan Engholm, Infanoj-Torento
99. Gösta Henriksson, Per m orciklo en tri landoj
100. Rolf Nördenstreng, La homaj rasoj de la mondo
101. Karl Lindqvist, Ferio kun morto
102. Ferenc Szilagyi, La Granda Aventuro
103. Ferenc Szilagyi, Koko kaj jam
104. Aleksii Kivi, La fianĉigo I
105. Aleksii Kivi, La Botistoj
106. Knut Hamsun, Victoria
107. J.H. Rosbach, Bagatelaro
108. Björnstj. Björnson, G. Knabo
109. Axel Munthe, San Michele

ENENS KEM.TVÄTT & SKRÄDDERI

KONSTSTOPPNING – PÄLSFÖRVARING

Råsundavägen 139, Solna
T-bana nr 11 hållpl. Näckrosen
eller buss 515. Tel. 08-27 59 48.

Verda stelo - 10%

JARLIBROJ DE U.E.A.

Ĉu vi kolektas?

Ni posedas kelkajn kromzemplerojn ek de 1910 ĝis nun. Mankas nur la jaroj 1915, 17, 21 kaj 29.

La plej malnovaj estas unuopaj, la modernaj estas pluraj.

Helpu nin liberigi kelkajn titolojn en Esperanto Centro!

Por la malnovaj vi pagu iom laŭvole, la modernajn vi ricevos senkoste.

Vi kompreneble kovru la sendokostojn.

Do, skribu tuj al E.C.

Har du talat med din arbetskamrat om "Esperantofrämjandet"?



TRA LA LANDO

Kommande turnéer

I mars har SEF just slutfört en turné med Maurice Sujet, som berättat om Kina ur olika aspekter. Olika klubbar har ordnat samarbete med skolor och klubbar på olika sätt. Läs hans artikel på annan plats i tidningen och få tips.

Jag vill här nämna lite om vad som är på gång för hösten 1986 och våren 1987. Jag har kontakt med en läkare från Indien, som bl a kan föreläsa om indisk alternativ medicin, om diabetes eller helt enkelt om landet Indien ur olika aspekter.

Myrtle Green från England kan föreläsa om sitt liv på ön Sark – ön utan bilar – sagoön i Engelska kanalen.

Även Stanislaw Burba är intresserad av att komma och berätta om Warszawa – staden för jubileumskongressen.

Våren 1987 kommer antagligen våra sjungande flickor från Polen – Ewa och Anita. Dessutom har jag kontakt med Ferenc Jaki från Ungern. Han kan tala om finsk-ugrisk litteratur eller om Ungern.

Jag kommer att gå ut till regionsansvariga med förfrågan om var man vill arrangera program, men jag vill gärna göra ett försök att varje klubb redan nu kan skriva till mig och anmäla intresse. Jag kommer som vanligt att be föreläsarna om material, så att jag kan skicka ut det till klubbarna. Ni som hade arrangerat Maurice Sujet såg att om bara jag får material så får ni också.

Hör av er med preliminärbeställningar före 1 juli. Adress: Kerstin Rohdin, Ringv. 11 B, 579 00 Högsby tel 0491-204 61.

Post turneo pri Ĉinio...

Karaj geamikoj

Post dusemajna zigzaga turneo tra Svedio dum kiu mi prezentis etan parton de miaj diapozitivoj pri Ĉinio mi deziras danki plej kore al ĉiuj kiuj ebligis tiun prezentadon; de Gotenburgo al Norrköping, tra Kungälv, Kungsbacka, Skövde, Falköping, Floby, Västerås kaj Motala. Al ĉiuj organizintoj, al ĉiuj helpintoj, al ĉiuj tradukintoj, al ĉiuj gastigintoj, mi deziras ĉi-tie esprimi mian plej varman dankon.

Malgraŭ la viruso kiu trafis min je mia alveno en Svedio mi esperas ke mi sukcesis doni al vi emon pli bone koni Ĉinion, ĝian riĉan historion, ĝian antikvan civilizacion, kaj ĝian afablan laboreman popolon kiu nuntempe evoluas rapide sub niaj okuloj. Mi ankaŭ esperas ke mia prelego en la liceo de Motala, pri Esperanto, same

kiel miaj informigaj kontaktoj kun pluraj direktoroj de lernejoj, estis semoj jetitaj por nia lingvo. Ni ja scias ke "mil semoj perdiĝas" sed eble, iam kelkaj el ili mirakle kreskos.

Mallonga prezentado ne ebligis penetri profunde en la misterojn de la ideogramoj, aŭ paroli pri la yin-yang teorio, aŭ pri akupunkturo, aŭ pri Tai-Ji-Quan kiu ebligas konservi sanon kaj juncon" sed, se vi havas la eblecon partopreni la venontan kongreson en Pekino ne manku tiun okazon, certe unikan en via vivo, pli bone konatigi kun tiu interesa kaj aktuala lando.

Por danki vin, kiuj pacience aŭskultis miajn modestajn parolojn pri Ĉinio, jen kelkaj ĉinaj

proverboj kiuj pruvos al vi la delikatecon kaj subtilecon de la ĉina penso:

Afabla homo ne marŝas sur la ombbron de sia najbaro.

Ĉiu herbofolio havas sian rosoĝuton.

La plej bonaj kudriloj havas nur unu pinton.

La jaroj plibonigas la vinon kaj la saĝulon.

Kiam vi trinkas akvon pensu pri la fonto.

Unu peco da oranĝo estas same bona je la gusto kiel la tuta oranĝo.

Kaj fine, unu lasta kun kiu vi espereble konsentos: "Vorto veninta el la koro varmigas dum tri vintroj". Karaj svedaj geamikoj, kiuj tiel afable akceptis min, bonvolu ricevi tiamaniere miajn dankesprimojn dum ekstere brilas la suno kiu alportas al vi la tiel sopiratan printempon.

Maurice Sujet
1986-03-23

Suda regiono

La Helsingborga Esperanto-societo

festis sian 52-an jarkunvenon la 3-an de februaro 1986. Inga Magnusson, kiu estis la societa prezidanto dum 20 jaroj, estis reelektita ankaŭ por la jaro 1986. Nova membro en la estraro estas Kjell Randedhed.

La societa sekretario kaj studgvidanto Barbro Haraldsson intensas reprezenti la societon je la 71-a Universala Kongreso en Peking, Ĉinio 1986.

Intensivkurs 24-25 maj

Södra distriktet av Svenska Esperantoförbundet inbjuder till intensivkurs i esperanto 24-25 maj på Markaryds folkhögskola. Kursen vänder sig till:

Grupp 1
Nybörjare, som förutom grundkursen i esperanto får en kort

orientering om språkets historia och utveckling.

Grupp 2

Personer, som tidigare deltagit i en eller två intensivkurser, eller som gått en vanlig nybörjarkurs. Kursen är väl anpassad efter denna kategori.

Grupp 3

Personer, som önskar kurs i konversation och grammatik.

Grupp 4

Mera avancerade. Konversation, talövningar, grammatikövningar.

Vi vill särskilt propagera för grupp 4, som utmärkt väl lämpar

sig för de flesta av La Esperos läsare. Vi har tidigare haft svårt att få deltagare till just denna grupp. Iva Åberg tar hand om den. Utnyttja detta fina tillfälle att under stimulerande ledning förbättra dina redan goda språkkunskaper. Avgiften är 300 kr i dubbelrum och 350 kr i enkelrum och inkluderar mat, logi, kursavgift och kursmaterial.

Anmälan före den 16 maj till Bertil Andreasson, Södra Rörum pl 455, 242 00 Hörby, tel 0415-501 52

TEDU- regiono

Motala Esperantoklubb har hållit årsmöte i Dubergska gården. Av årsredovisningen framgår att medlemsantalet ökat. Informationsverksamheten har varit omfattande. Sålunda har bl a föredrag om FN-tjänst vid gränsen mellan Indien och Pakistan hållits och information om Amnesty International lämnats.

Den utåtriktade informationen har skett genom utställning på sex postkontor med anledning av Postverkets under året utgivna bok "Skriv brev på esperanto", vilken Motalaklubben tagit initiativet till. Information om det internationella språket har skett i olika skolor i Motala och Vadstena. Utländska esperantister har uppträtt i föreläsningssällskapet, huvudbiblioteket, Platenskolan, Dagfolkhögskolan, Teatercaféet och hos musiklinjen i Motala av LO:s Folkhögskola.

Esperanto i skolan

Under sportlovsveckan anordnade Norrköpings Esperantoklubb introduktionskurser i esperanto för de lediga skolungdomarna. Norrköpings fritidsförvaltning



La klubo en MALMÖ 80-jara

En aprilo ĉiujare unu el la plej konataj svedaj Esperanto-Societoj – Klubo Esperantista de Malmö – festas sian 80-jaran jubileon.

Sveda Esperanto-Federacio kaptas la okazon transdoni la plej koran gratulon. Se oni volus memori pri la farita laboro de la nomita loka societo, oni bezonus grandan spacon.

Pro tio ni deziras tre, tre malonge mencii kelkajn elstarajn detalojn el la historio de la klubo en Malmö. Ĝi fondiĝis la 12-an de aprilo 1906. En la sama jaro, sed iom pli malfrue, Malmö kune kun kelkaj aliaj svedaj lokaj societoj fondis nian landan asocion (nunan SEF-on).

En la unua estraro oni rimarkis dir-on H.S. Hermod (dir. de la konata koresponda instituto). Jam en 1914 la klubo estis preta inviti al "Baltaj Esperantistaj Tagoj" okaze de la Balta Ekspozicio en Malmö.

Plurfoje SEF jarkongresis en Malmö. Ni ĉiuj bone memoras i.a. la 75-jaran jubileon por kaj SEF kaj Malmö. Sveda Esperanto-Instituto plurfoje aranĝis en la proksima Frostavallen la "Svedan Someran Semajnon", kiun plejparte administris la klubo en Malmö.

Antaŭ UK Stokholmo en 1934 kaj post UK Kopenhago en 1956 la klubo en Malmö aranĝis antaŭkongreson resp. postkongreson. Sed la plej grandan taskon la



klubo plenumis en 1948, kiam okazis la UK en Malmö.

Eldona Societo Esperanto (Esperantoförlaget) havas de post la jaro 1957 sian ekspedejon en Malmö kun Malmöanoj kiel prizorgantoj.

Jam en 1931 la monata informilo de la klubo "La Folio" komencis aperi, kaj studante la klubajn programojn oni rimarkas vere bonajn aranĝojn i.a. en kombino kun longa vico de eksterlandaj gastoj el vere multaj landoj.

Se oni volus en malgranda gaza spaco mencii ankoraŭ nur kelkajn detalojn estus:

– pluraj ĉiujaraj ekspozicioj diversloke

– ĉiujare ek de 1951 ekspozicio ĉe "Skånemässan"

– la unua Esperanto-Strato de Svedio

– haltejo kun la nomo "Esperantogatan" ĉe aŭtobusa linio

– amikaj kluboj en kaj Samarkand kaj Hamburgo

– ĉiujare kursoj diversmanieraj

– jam en 1927 la unua propra klubejo en-havanta propran kreskantan bibliotekon

– pluraj aliaj kluboj, unu post la alia, ĉiam pli efikaj kaj modernaj.

ger till varje sportlov ut ett litet häfte, där de olika föreningarna får presentera sina aktiviteter. Det är första gången som Norrköpings-klubben har utnyttjat denna möjlighet och resultatet var förbluffande. Trots de få ord om kursen som var i häftet kom det sammanlagt 37 intresserade ungdomar. Så gott som alla skolor stod oanvända under veckan, men det var mycket svårt för oss att få tillåtelse att vara i någon skola. Till slut fick vi klartecken från de Geer-skolan att få använda en sal. Vi upptäckte redan på måndagen att vi behövde ytterligare ett klassrum. Och tack vare att jag är medlem i Norrköpings astronomiska klubb som har tillgång till en sal i samma skola, kunde vi använda en sal till.

Det är intressant att se medelåldern på de som deltog. Den var nämligen bara 12 år, och samtliga var mycket intresserade att få lära sig esperanto. Margaretha Skarin tog hand om nybörjarna, som det kom nya av varje dag, medan jag under de tre första dagarna tog hand om sex skolkamrater som ville fördjupa sig lite mer än de andra. Efter endast två dagars studier, kunde de skriva brev på esperanto felfritt.

Vi hade tänkt att ha kurser måndag-torsdag, men tack vare att Radio Östergötland kom och intervjuade en av kurserna på måndagen fick vi anordna en extra kurs på fredagen. Intervjun sändes ut redan på tisdagsmorgonen, och det var mycket tack vare den som det blev ett så stort deltagarantal.

Många av dem som gick på sportlovskurserna vill fortsätta med esperanto, så redan nu har vi startat två veckokurser med 20 deltagare.

Mikael Hultgren

UEA informas

Speciala numero de la revuo LPLP pri esperanto

Honore al la Centjariĝo de Esperanto en 1987, ni serĉas manuskriptojn por memoriga numero de **Lingvaj problemoj kaj lingvo-planado** dediĉita al la historio de Esperanto, ĝia nuna stato kaj ĝia estonteco. Nin aparte interesos manuskriptoj, kiuj traktas la lingvan evoluon de Esperanto, la historion de la Esperanto-movado, Esperanto-literaturon, la utiligon de Esperanto en edukado kaj esploroj, la rolon de Esperanto en internaciaj organizoj, kaj sociologian/socilingvistikan analizon de Esperanto-organizoj kaj Esperanto-grupiĝoj, naciaj kaj internaciaj. Proponataj tekstoj povas esti

en iu ajn lingvo. Aŭtoroj bonvolu sendi tri ekzemplerojn de ĉiu manuskripto, kune kun mallonga resumo de la artikolo en Esperanto, angla aŭ franca, kaj biografieto, al **d-ro Humphrey Tonkin, administra redaktoro, LPLP, State University College, Potsdam, NY 13676, Usono**. Manuskriptoj devas atingi tiun adreson ĝis la 30-a de septembro 1986. Ĉiu manuskripto estos recenzata de almenaŭ du redakcianoj de **LPLP**.

Oni antaŭvidas, ke tiu numero formos parton de volumo 11 (1987) kaj aperos en la aŭtono de 1987.

LPLP: Grava enhavo en la deka volumo (1986)

Artikoloj en la angla, franca, itala kaj germana estas inter tiuj, kiuj aperos en la deka volumo (1986), de LPLP, la revuo **Lingvaj problemoj kaj lingvo-planado**.

Artikoloj antaŭvidataj por la deka volumo kaj aparte interesaj al esperantistoj kaj tiuj, kiuj interesiĝas pri la idea fono de esperantismo, estas tiu de Andrea Ĉiĉi-Batelli, pri la okcidenteŭropa lingva situacio kaj eventuala utiligo de Esperanto, kaj tiu de Jean-Claude Boulanger pri neologismoj en la franca lingvo de Kebekio. Arthur Baur kontribuos artikolon pri la retoromanĉa, Max-Peter Gruenais pri la irlanda lingva situacio, kaj Neil kaj Suzanne Ridler pri lingvo kaj ekonomiko. Aperos ankaŭ raportoj pri la konferenco pri plurlingvismo kaj komunikado, organizita de UEA ĉe Unesco en novembro, kaj la konferenco pri lingvo kaj

komunikado en Novjorko en decembro, kiu estis komune organizita de CED kaj de la Traduka Fakto de Unuiĝintaj Nacioj.

LPLP aperas trifoje jare, sur tricento da paĝoj. Ĝi estas abonebla kontraŭ 18 usonaj dolaroj aŭ ekvivalento ĉe UEA kaj ĝiaj perantoj aŭ ĉe University of Texas Press, P.O. Box 7819, Austin, TX 78713, Usono. La revuo ĉiam enhavas ampleksajn resumojn de ĉiuj ĉefaj artikoloj en Esperanto.



Amikeco trans limoj

La kunfratinoj

La kunfratinoj — societo por helpo al evoludandoj ĉe Alfa-Laval, direktita de virinoj por virinoj.

Kiam kelkaj virinoj laborantaj ĉe Alfa-Laval en Lund printempe 1984 fondis la societon LA KUNFRATINOJ, neniu pensis pri tio ke fakte temas pri paclaboro. La ĉefa celo estis cedi parton de ĉies abundeco al aliaj, sed ankaŭ havi ne nur la ĉiutagan laboron komune. Oni aliĝis al projekto de Rädde Barnen, nome La Kunfratinoj — de tie la nomo de la societo. Post jaro tamen venis la momento kiam la societo volis havi propran projekton.

Estiĝis la projekto MINILAKTEJO. Oni decidis kolekti monon por tia minilaktejo por poste ĝin donaci al virina kooperativo en afrika lando. Kelkaj virinoj vojaĝis al la virina konferenco de UN en Nairobi somere 1985 kaj tiam ekhavis kontakton kun la kooperativo Tetu en Nyeri ĉe la piedo de Monto Kenjo, 200 kilometrojn norde de Nairobi. Temas pri miksitita kooperativo, tamen sub gvido de prezidantino, Grace W Ngambi. Estas planite uzi la profiton de la laktejo por specialaj virinaj projektoj, ekz. por aĉeti kudromaŝinojn, por edukado, evoluo de agrikultura ilaro k t p. Tradicie en Afriko la virinoj prizorgas la nutraĵproduktadon, sed oni priatentis la edukadon kaj evoluon samgrade kiel aliajn projektojn.

La minilaktejo de Alfa-Laval evoluis speciale por kamparaj regionoj en la tria mondo kaj ĝi baziĝas sur simpla tekniko. Ĝi kostas proksimume unu milionon da kronoj, sed kiel idea organizaĵo la societo havas la eblecon ricevi subtenon de SIDA.



La Kunfratinoj ankaŭ altiris la intereson de Prezidanto Moi, kiam li akompanata de siaj sekurecgardistoj kaj ministroj preterpasis la standon. De maldekstre: Elisabet Brunnberg kun filino Moa, 10-jara, kaj Ulla Säterher. (La bildo aperis en la kenja gazetaro). Foto: Wallace Grichere.

Hodiaŭ la societo La Kunfratinoj havas 200 membrojn (50 procentoj da viroj), kiuj kune pere de salajroreduktoj donacas monate proksimume 4 000:— kronojn. La societo ankaŭ ricevas subtenon kaj de privataj personoj kaj asocioj.

En majo La kunfratinoj partoprenos la virinan konferencon en Uppsala "Virinoj montras la vojon". En la foirkatalogo ili prezentas sin jene:

"Ni partoprenas en la foiro ĉar ni deziras etabli kontakton kun niaj fratinoj en la komerca kaj industria vivo, krei retaron kaj kunlabori ĉirkaŭ nia ideo: malgran-

da helpagado, rekte koncentrita al virinoj, direktita de virinoj. Nia unua projekto estas minilaktejo por kooperativo en Kenjo — kiu havas prezidantaron.

Tutmonda retaro ne nur estas elemento en nia klopodo ĉesigi la mondan malsaton — ĝi ankaŭ helpas nin kolekti spertojn rilate projektadon kaj sendependigi nin ekonomie, sendepende de tio ĉu ni loĝas en evolulando aŭ industrilando.

Ni lernas unu de la alia — ni helpas unu la alian.

Ja temas pri paclaboro, ĉu ne?

Ulla Säterher, Lund

Amu vian malamikon!

La pastro al la nereformeblulo:

— Vi ja scias. Ola, ke la alkoholo estas via plej danĝera malamiko!

— Jes, sed estas skribite, ke oni devas ami sian malamikon.

— Tre vere, sed ne, ke oni englutu lin, Ola, — ne, ke oni englutu lin.

Amikeco trans limoj

Organizo de handikapitoj deziras korespondantojn al siaj membroj.

Skribu al:

Marie Havránková

Kosmonautů 17

625 00 Brno

Ĉeĥoslovakio

Juna Amiko

J A aperas trifoje jare sur 72 paĝoj. Uzante 700 vortradikojn ĝi publikigas rakontojn, poemojn, kantojn kaj diversajn interesofojn, instruas kaj amuzas per facilaj tekstoj. Eldonas Hungara Esperanto-Asocio, Budapeŝto, Kenyérmező, u. 6, redaktas O. Kníchal. Abonoj ĉe UEA, Nieuwe Binnenweg 176, 3015. BJ Rotterdam, Nederlando. Prezo de la jarkolekto 5, 70 gld. aŭ egalvaloro.



Skaniano vizitas Kopenhagon kaj rigardas la rondan turon, "Rundetaarn". Dano diras al li:
— Tiajn altajn turojn vi ne havas en Skanio.

— Ne-ee, tiajn ni ne havas, sed se ni havus tiajn, ili estus multe pli altaj kaj multe pli rondaj.

Rememoro

Mi trovis en Västerbottens-Kuriren notizon: "Klipp ur VK för 50 år sedan..." priskribon de jarkunveno en esperantoklubo en Nysättra, Västerbotten.

Ĝi vekis multajn memorojn. 1935 estis jaro post la 26-a internacia kongreso en Stockholm 1934 en kiu mi kaj mia frato Gösta Hansson partoprenis kune kun 2000 partoprenantoj de 36 landoj.

Kongresejo estis la Parlamenta domo (la malnova kaj la nuna), "La solena malfermo" okazis en Koncerta Domo, la urbo Stockholm gastigis nin en la Urba Domo kaj Carl Lindhagen bonvenigis nin en esperanto.

Estis mia unua vizito en Stockholm kaj por mi la tuta mondo malfermiĝis! Stockholm fariĝis turista urbo: en restoracioj kaj kafejoj oni sur tabloj trovis skribite: "Ni parolas esperanton" — bedaŭrinde ili ne ĉiam faris, sed ili tamen montris ke ili volis uzi la lingvon.

Kiel rezulto de la sukcesa kongreso sekvis granda, vasta intereso en Svedio por la lingvo kaj esperantaj kluboj kreskis en multaj lokoj.

Sed la mondmilito detruis organizaĵojn — mortigis ankaŭ en multaj landoj la tutan ideon kaj ankaŭ la homojn kun la ideoj.

Post la milito la esperantistoj denove renkontiĝis en Bern 1947. Tie mi renkontis inter aliaj doktoro Wanda Zamenhof, reprezentanto por la Zamenhofs familio. Si estis filino de doktoro Ludoviko Zamenhof, mi kredas la sola vivanta de la tuta familio.

Por mi la esperantomovado kaj la paca movado estas firme kunligitaj. La danĝera situacio en la mondo, la konstanta minaco devigis min aktivigi miajn fortojn kontraŭ.

Kun saluto al ĉiuj pacbatalantoj en la esperanto movado.

Valborg Hansson Seger

OPINIO

Ĉu vi posedas veteranan aŭ alian malnovan aŭton?

Mi mem posedas 30-jaraĝan "malnovulon" kiu bone funkcias kaj per kiu mi venontjare veturos al la jubilea kongreso al Varsovio. Se vi havas veteranan aŭ alian

pli ol 30-jaraĝan aŭton kiu tiel bone funkcias ke vi provas partopreni "Esperanto-Ralion" al Pollando — bonvolu skribi tuj al mi. Estus interese se ni povus aranĝi internacian renkontiĝon por veteran-kaj malnovaŭtoj dum la kongressemajno.



Henry Thomander, Skalbaggvägen 21, S-611 63 Nyköping, Svedio

Internationell esperantokurs 28/7-1/8 1986 för dig, som vill ha vänner världen runt

Nybörjare får undervisning tre timmar per dag.

För andra ordnar vi diskussionstillfällen, föreläsningar osv. För alla ordnas utflykter och gemensamma samkväm.

Under kursveckan har du möjlighet att lära känna Åbo med omnejd.

För detta betalar du 900 finska mark.

Du bor i två personersrum med alla bekvämligheter. Om du vill ha eget rum, är tilläggspriset för enkelrum 100 FM.

Kom med bland nya vänner och nya upplevelser!

Du ska anmäla dig före 1/7 1986 till Varsinais-Suomen Kansanopisto, 215 30 Paimo, Finland.



Nekrologo

Sven Berlin, multjara esperantisto kaj membro de Esperantista Klubo de Halmstad, forpasis la 4-an de marto 1986. Dum kelkaj jaroj li estis kasisto kaj bibliotekisto de la klubo.

En 1987 en Sofio okazos Ekspozicio de kolektaĵoj

honore al 100-jara jubileo de Esperanto en tri sekcioj: 1. D-ro L.L. Zamenhof sur bildkartoj. 2. bildkartoj kun surskriboj en Esperanto. 3. Kongresaj urboj de Universalaj kongresoj de Esperanto. (Prefere en la jaro de la koncerna kongreso). Preparas la ekspozicion la konata bulgara kolektanto-esperantisto Georgi Litov, sub la

aŭspico de Bulgara Esperanta Asocio kaj la Asocio de Bulgaraj Filatelistoj. Estas petataj al la esperantistoj tutmonde kontribui al la ekspozicio por dispono de konvenaj eksponaĵoj, ĉu donace, ĉu rekompence.

Ĉion sendu al adreso:

Georgi Litov Hipodruma 34-A,
1612 Sofio, Bulgario

Internacia Jura Revuo

La Revuo aperas du fojojn jare kun riĉa kaj varia enhavo, ĉefe en la sferoj de jura teorio, kompara juro kaj internacia juro. Ĉiu kalendaro havas 48 paĝojn. Kvankam sur alta faka nivelo, tamen la stilo estas populara kaj facile komprenebla por ĉiu iom interesita klera esperantisto. La membroj de IEAJ (jara kotizo 150 aŭstraj ŝilingoj) ricevas la revuon senpage, sed IJR estas abonebla ankaŭ ekster la membreco. La abonkotizo estas same 150 ŝilingoj jare. La aliĝojn, abonojn kaj kotizojn akceptas la sekretario-kasisto de IEAJ, samtempe redaktoro de IJR, D-ro Klaus Perko, Lendkai 111. A-8020 Graz, Aŭstrio, poŝta ĉekkonto n-ro 1257.845.

VENIS LETERO...

"Dankon por via leterkurso. Mi deziras nun kelkajn ekzemplerojn de la unua letero por doni al interesuloj.

Sur la aldonita bildkarto vi povas vidi kiel agrable ni vivas ĉi tie en la sveda montaro. Krome la homoj ĉi tie estas malfermaj por la estonteco, tial mi bezonas la leterkurson por disvastigi.

Se troviĝas esperantistoj, kiuj deziras feriadu en la montaro, estus agrable por mi doni al ili

mian gastkabanon por kelkaj tagoj.

Amike
Inger Lannergård
Ingebo
820 93 Hede"

Ni respondis kaj demandis, ĉu estas vero, ĉu ni rajtas informi al nia legantaro kaj ĉu ŝi pripensis la konsekvencojn.

Telefone Inger respondis: Jes. Ŝi havas nur unu kondiĉon: La gastoj devas paroli esperanton kun ŝi.

Ingemar Nordin



Korespondpetoj

30 personoj el Brazilio deziras korespondi kun svedoj. Ili reprezentas multajn diversajn metiojn: Gelerntojn, instruistojn, flegistinojn, ekonomistojn, geografistojn ktp. Ili estas inter 19 ĝis 34 jaroj. Liston de iliaj nomoj kaj adresoj vi povas ricevi de Esperanto Centro.

Esperanto Klasoj
10, Keskoolo
SU-200016 TALLINN
Estonio

Esperantolernantoj 12-17 jaroj deziras korespondgeamikojn en Svedio.

Davudo Takavorio
adreso troviĝas
ĉe EsperantoCentro
Irano

Komencanto kiu volas korespondi pri diversaj temoj.

Roze Aukstikálnyté
kaj **Csaba Székely**
Zsivánovics u. 8 fsz 2
H-6500 BAJA
Hungario

25-jara litovino kaj 30-hungaro deziras korespondi tutmonde pri div. temoj, kolektas bildkartojn pri hundoj.

J Fernando Martinez Munoz
Plaza Condesa de Gavia 4, 10A
E-28020 MADRID
Hispanio

23-jara junulo dez. korespondi kun junulinoj samaĝaj. Ŝatas sportojn kaj volas konatiĝi kun aliaj kulturoj.

AR Zsazsa
HU-7625 Pécs,
Surányi u. 14
Hungarujo
45-jara komencantino

Maryla KUJAWSKA
PL-05 806 Komarów
Ul. Klonowa 22
Pollando

Volas korespondi pri turismo, etnografio kaj kulturo.

Przemystaw Piekarski
ul Piekna 25 m 22
PL-96300 Zyrardow
Pollando


20-jara junulo kiu deziras korespondgeamikojn. Trejnas bokson kaj ŝatas junulara muzikon

Krucvorto

1. Himlakropp
2. Stjärnbild
3. Stjärna
4. Kikare
5. Sol
6. Planet
7. Jordklot
8. Komet
9. Universum
10. Måne

Sendu vian solvon al
Åke Blomberg, Lidåkersgatan
6 C, 531 39 Lidköping plej laste 14 tagoj post la alveno de la gazeto.

LA SPACO



? = _____